

Belega ĝardenfesto ĉe familio Grebe en Bremen

Danke al la Vezer-tunelo okazas aktivaj komunikiĝoj al la Esperanto-Grupo Bremen. Ni dankas por la invito kaj la gastameco, kiun ni spertis la 7-an de Julio 2004 okaze de la ĝardenfesto. Ni ĝuis bongustajn manĝaĵojn, la trankvilon kaj naturon. La gesamidanoj de la Esperanto-Grupo Bremen partoprenis nian monatan grupvesperon la 18-an de Aŭgusto 2004 en Elsfleth, "Haus Visurgis". Ni ĝojus, se ili plue venos al niaj renkontiĝoj kaj per tio, nia babilado pliriĉiĝus.

Termine

Die **wöchentliche Übungsstunde (KLERO)** findet statt donnerstags ab 19.45 Uhr in der "Evangelisch-lutherischen Kirchengemeinde Brake", Kirchenstraße 24, 26919 Brake.

Die nächsten **monatlichen Treffen** finden statt ab jeweils 19.30 Uhr am **26. Oktober 2004** in Oldenburg und am **23. November 2004** in Brake. Treffpunkte können unserer Internetseite <http://www.esperanto.de/unterweser> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen.

Außerdem:

02.10.2004 EMAS-Kulturtag in Hannover
EMAS: Esperanto en Malsupra Saksio)
13.10.2004, 20.00 Uhr Treffen der Esperanto-Gruppe Bremen im "Brodepott"
10.11.2004, 20.00 Uhr Treffen der Esperanto-Gruppe Bremen im "Brodepott"
08.12.2004, 20.00 Uhr Zamenhof-Fest der Esperanto-Gruppe Bremen
(Familie Kruse lädt ein.)

Kiu volas partopreni, bonvolu informi nin.

Impressum: **Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.**
(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Information und Redaktion: Anne Höpken: 04731-4837
Dörte Bierkämper: 04404-3368
Andreas Kück: 04702-5044
Mario Müller: 04732-1373

Für Beiträge und Spenden:

Bankverbindung:
Landessparkasse zu Oldenburg; BLZ 28050100; Kontonummer 298174
(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 10

Okt. 04 – Jan. 05

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Anne sur la Granda Muro

Ni gratulas Andreas pro lia Esperanto-diplomo

La Esperanto-Asocio de Britio (EAB) ofertas interalie Esperanto-ekzamenon por progresintoj ("Advanced Examination"). Mi, Andreas, "mendis" ĝin sen antaŭa trapaso de la baz- kaj mezgrada ekzamenoj. La ekzameno konsistis el skriba kaj parola parto; kostoj: 20 resp. 10 britaj pundoj. Post kiam mi estis paginta, la EAB sendis al mi la taskojn de la skriba ekzameno kaj krome formularon. Sur tiu mi persubskribe deklaris ne uzi la helpon de aliuloj. Vortarojn kaj aliajn librojn mi rajtis uzi. La skriba parto konsistis el tri subpartoj, kiujn mi devis pretigi dum du monatoj: 1) *komprenado*: respondi Esperantlingve demandojn pri ekstrakto el literatura verko (temis pri enhavo, gramatiko kaj lingvaĵo); 2) *traduko*: el Esperanto en la anglan kaj inverse po du tekstoj (tiu ĉi tasko ŝajnis al mi iom malfacila, ĉar mi ja ne estas gepatra anglalingvano); 3) *verkado*: verki mallongan Esperantlingvan eseon pri unu de mi elektota temo el kelkaj proponitaj temoj. Post tri semajnoj, mi estis pretiginta la respondo-foliaron. La tuta afero memorigis min iel pri la franclingvo-ekzamenoj, kiujn mi estis trapasinta en la gimnazia supera klaso multajn jarojn antaŭe. Nu, tiam mi devis pretigi la taskojn dum nur malmultaj horoj. La EAB sciigis al mi la telefonnumeron de mia ekzamenisto de la parola ekzamen-parto. Mi telefonis lin kaj ni interkonsentiĝis pri konvena ekzamen-dato kaj -horo. Je la horo, pri kiu ni estis interkonsentiĝintaj, mi telefonis lin denove, kaj ni trapasis jenajn tri subpartojn telefone dum ĉirkaŭ dudek minutoj: 1) La ekzamenisto kaj mi Esperantlingve interparolis pri ĉiutaga afero. 2) Mi estis petita rerakonti Esperantlingve mallongan historion, kiun la ekzamenisto estis laŭtleĝinta al mi dufoje antaŭe. 3) Mi estis petita laŭtleĝi mallongan Esperanto-tekston kaj poste traduki ĝin en la anglan. (La ekzamenisto antaŭe estis sendinta al mi la tekston en gluferrita koverto, kiun mi malfermis nur dum la ekzameno.) Post la ekzameno, mi estis sufiĉe optimista. Kaj fakte post kelkaj tagoj, la EAB gratulis min pro mia sukceso en ambaŭ ekzamen-partoj. Mi ricevis belan diplomon. Ĝi atestas, ke mi "posedas la lingvon". Tio signifas jenon: Mi estas kapabla paroli ĉiutagan Esperanton, ne perfekte, sed modere flue kaj sen gravaj eraroj. Kaj mi rajtas nomi min "Diplomito de Esperanto-Asocio de Britio". Mi trovas bone, ke mi povis trapasi la tutan ekzamenon nur perpoŝte kaj pertelefone. Jen la adreso de la EAB: Esperanto-Asocio de Britio, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE, telefono: +44 (0)1782 372 141, interreto: <http://www.esperanto-gb.org>. Cetere: Je <http://www.esperantoeducation.com/exams.html> estas pliaj informoj. Tie oni povas ankaŭ elŝuti ekzemplodonan demando-foliaron.

Wir gratulieren Andreas zu seinem Esperanto-Diplom

Der britische Esperanto-Bund ("Esperanto-Asocio de Britio") bietet u. a. eine

KLERO - Gemeinsames Esperanto-Lernen an der Unterweser

Seit April 2004 veranstalten wir in unserem Verein Esperanto-Gruppe Unterweser (<http://www.esperanto.de/unterweser>) nahezu wöchentlich für jeweils anderthalb Stunden das gemeinsame Esperanto-Lernen "Komuna Esperanto-LERNadO", abgekürzt KLERO. ("Klero" bedeutet übrigens "Gebildetes".) KLERO soll Vereinsmitgliedern und interessierten Außenstehenden ermöglichen, ihre Esperanto-Kenntnissen zu verbessern. Für dieses Vorhaben fanden sich vier Vereinsmitglieder und zwei Außenstehende. Die KLERO-Treffen finden donnerstags ab 19.45 Uhr in Brake statt. Zunächst verschafften wir uns einen Überblick über die verschiedenen Vorkenntnisse der Teilnehmer. Außerdem erstellten wir eine Liste über Lehrmethoden, Lehr- und Wörterbücher, Tonmaterialien, rechnergestützte Kurse sowie Möglichkeiten des Esperanto-Hörens und -Sprechens mit Hilfe von Rundfunk und Internet. Nun hatte keiner der Teilnehmer eine besondere Esperanto-Lehr-Erfahrung, geschweige denn eine Esperanto-Lehrerausbildung. Und es kam keine Möglichkeit in Betracht, externe Lehrer einzubinden. Deshalb war eine Methode des geführten Selbstlernens natürlich von besonderem Interesse für uns ("Methode Schiffer", <http://www.mia-serio.de/metodo.htm>). Zwei KLERO-Teilnehmer waren absolute Anfänger. So entschlossen wir sechs uns für ein gemeinsames Esperanto-Lernen und -Lehren von der Pike auf in nur einer Gruppe. Hierfür zeigte sich das Lehrbuch "Mein Schlüsselloch - Mia Ŝlosiltruo" aus der Reihe "Mia-Serio" als zweckmäßig. Das Niveau und die Darstellung erscheinen uns sehr gut angepasst an die Bedürfnisse von Anfängern. Auch ist es vorteilhaft, dass zu den Übungen die Lösungen angegeben sind und so die Lösungen als weitere Übungen herangezogen werden können. Wir arbeiten das Lehrbuch Schritt für Schritt (besser: "Blick für Blick") durch. Einer unserer Teilnehmer, Andreas, hat recht gute Esperanto-Kenntnisse und fungiert daher praktisch als Lehrer. Er achtete vom ersten Esperanto-Wort an auf eine richtige Aussprache und beantwortet Fragen der Teilnehmer zur Sprachlehre. Auch legt er bei allem Gelernten Wert auf den Bezug zum "Fundamento de Esperanto", der Grundlage unserer Sprache. Jeder Teilnehmer ist mit großem Einsatz und viel Freude dabei. Unbedingt verstärkt übenswert ist das Esperanto-Sprechen! Uns ist klar, dass wir hier den Teufelskreis "Nicht Esperanto sprechen - nicht sicher in Esperanto werden - nicht Esperanto sprechen" unbedingt durchbrechen müssen. Eine mögliche Abhilfe sieht Andreas in dem häufigen Teilnehmen an Gesprächen auf Esperanto via Internet mit Hilfe des Programms "PalTalk" (<http://www.paltalk.com>). Andreas nutzt dieses Programm seit November 2003 fast täglich für Gespräche auf Esperanto mit Menschen auf der ganzen Welt von zu Hause aus. Sein Wunsch und seine Empfehlung: Alle KLERO-Teilnehmer mögen dieses Programm zum Esperanto-Sprechen und -Hören nutzen. Trotz unterschiedlicher Wohnorte wären dann nämlich zusätzliche "Treffen" ohne Anfahrtsweg zum gemeinsamen Esperanto-Sprechen, -Hören und -Weiterlernen möglich. - Nähere Information zu KLERO bei Anne. - (Andreas, Anne, Dörte, Gisela, Renate, Udo-Eugen)

KLERO - Komuna Esperanto-LERnadO ĉe la Subvezero

Ekde Aprilo 2004, en nia klubo Esperanto-Grupo Subvisurgo (<http://www.esperanto.de/unterweser>), ni okazigas preskaŭ ĉiusemajne dum po unu horo kaj duona la "Komunan Esperanto-LERnadOn", mallongigite KLERO. KLERO celas ebligi al klubanoj kaj interesiĝantaj eksteruloj plibonigi ilian Esperanto-konon. Por tiu ĉi projekto trovis sin kvar klubanoj kaj du eksteruloj. La KLERO-renkontiĝoj estas en Brake ĉiŭjaŭde ekde la 19.45 horo. Unue ni havigis al ni superrigardon pri la diversaj antaŭkonoj de la partoprenantoj. Aldone al tio, ni faris liston pri instru-metodoj, lernolibroj, vortaroj, sonmaterialoj, komputil-apogataj kursoj kaj krome ebloj por la aŭskultado kaj parolado de Esperanto helpe de la radio kaj interreto. Nu, neniu el la partoprenantoj havis specialan Esperanto-instru-sperton, kaj tute nenian Esperanto-instruisto-kvalifikiĝon. Kaj ne povis esti konsiderate enigi eksterajn instruistojn. Tial metodo de kondukata memlernado kompreneble estis al ni je aparta intereso ("Metodo Schiffer", <http://www.mia-serio.de/metodo.htm>). Du KLERO-partoprenantoj estis absolutaj komencantoj. Tial ni ses decidiĝis por komuna Esperanto-lernado kaj -instruado ekde la komenco en nur unu grupo. Por tio ĉi, la lernolibro "Mein Schlüsselloch - Mia Ŝlosiltruo" el la serio "Mia-Serio" montriĝis taŭga. La nivelo kaj la prezento ŝajnas al ni tre bone adaptitaj al la bezonoj de komencantoj. Ankaŭ estas avantaĝe, ke por la ekzercaro estas aldonita la solvaro kaj tiel la solvaro povas esti uzata kiel plia ekzercaro. Ni tralaboras la lernolibron paŝo post paŝo (pli bone: "rigardo post rigardo"). Unu el niaj partoprenantoj, Andreas, havas sufiĉe bonan Esperanto-konon kaj praktike funkcias kiel instruisto. Li atentigis pri ĝusta prononco ekde la unua Esperanto-vorto kaj respondas demandojn de la partoprenantoj pri la gramatiko. Ankaŭ ŝatas li, pri ĉiu lernita afero, rilaton al la "Fundamento de Esperanto", la fundamento de nia lingvo. Ĉiu partoprenanto ĉeestas kun granda engaĝiĝo kaj multa ĝojo. Nepre plifortigite ekzercinda estas la Esperanto-parolado! Al ni estas klare, ke tiu-rilate, ni nepre devas trarompi la diablan cirkon "Ne paroladi Esperanton - ne fariĝi certa en Esperanto - ne paroladi Esperanton". Eblan rimedon vidas Andreas en la ofta partoprenado en Esperantlingvaj interparoloj perinterrete helpe de la programo "PalTalk" (<http://www.paltalk.com>). Andreas uzas tiun ĉi programon ekde Novembro 2003 preskaŭ ĉiutage por Esperantlingvaj interparoloj kun homoj en la tuta mondo el la hejmo. Jen lia deziro kaj rekomendo: Ĉiuj KLERO-partoprenantoj uzu tiun ĉi programon por la parolado kaj aŭskultado de Esperanto. Ĉar malgraŭ malsamaj loĝlokoj, tiuokaze aldonaj, sen-alveturvojaj "renkontiĝoj" por la komuna parolado, aŭskultado kaj plulernado de Esperanto estus eblaj. - Pliaj informoj pri KLERO ĉe Anne.

(Andreas, Anne, Doerte, Gisela, Renate, Udo-Eugen)

Esperanto-Prüfung für Fortgeschrittene an ("Advanced Examination"). Ich, Andreas, "bestellte" sie ohne vorheriges Ablegen der Grund- und Mittelstufen-Prüfungen. Die Prüfung bestand aus einem schriftlichen und einem mündlichen Teil; Kosten: 20 bzw. 10 Britische Pfund. Nachdem ich bezahlt hatte, sendete mir der britische Esperanto-Bund die Aufgaben des schriftlichen Teils sowie ein Formular. Darauf erklärte ich durch Unterschrift, nicht die Hilfe anderer zu nutzen. Wörterbücher und andere Bücher durfte ich benutzen. Der schriftliche Teil bestand aus drei Unterteilen, die ich innerhalb von zwei Monaten fertigstellen musste: 1.) *Sprachverständnis*: auf Esperanto Fragen zu einem Auszug aus einem literarischen Werk beantworten (es ging um Inhalt, Grammatik und Sprache); 2.) *Übersetzung*: jeweils zwei Texte aus dem Esperanto ins Englische und umgekehrt (diese Aufgabe schien mir ein wenig schwierig, weil Englisch ja nicht meine Muttersprache ist); 3.) *Schreiben*: einen kurzen Aufsatz schreiben über ein von mir zu wählendes Thema aus einigen vorgeschlagenen Themen. Nach drei Wochen hatte ich die Antwortblätter fertiggestellt. Die ganze Sache erinnerte mich irgendwie an die Französisch-Prüfungen, die ich viele Jahre zuvor auf der gymnasialen Oberstufe gemacht hatte. Nur damals musste ich die Aufgaben innerhalb von nur wenigen Stunden fertigstellen. Der britische Esperanto-Bund teilte mir die Telefonnummer meines Prüfers des mündlichen Prüfungsteils mit. Ich rief ihn an und wir einigten uns über ein passendes Prüfungsdatum und eine passende Prüfungszeit. Zum vereinbarten Zeitpunkt rief ich ihn erneut an, und wir tätigten telefonisch innerhalb von etwa zwanzig Minuten folgende drei Unterteile: 1.) Der Prüfer und ich führten ein Alltagsgespräch auf Esperanto. 2.) Ich wurde gebeten, auf Esperanto eine kurze Geschichte nachzuerzählen, die mir der Prüfer zuvor zweimal vorgelesen hatte. 3. Ich wurde gebeten, einen kurzen Esperanto-Text vorzulesen und ihn danach ins Englische zu übersetzen. (Der Prüfer hatte mir zuvor den Text in einem zugeklebten Umschlag gesendet, den ich erst während der Prüfung öffnete.) Nach der Prüfung war ich recht zuversichtlich. Und tatsächlich gratulierte mir der britische Esperanto-Bund nach ein paar Tagen zu den beiden bestandenen Prüfungsteilen. Ich erhielt ein schönes Diplom. Es bestätigt, dass ich die "Sprache beherrsche". Das bedeutet: Ich bin in der Lage, Alltags-Esperanto zu sprechen, zwar nicht perfekt, aber ziemlich fließend und ohne grobe Fehler. Und ich darf mich "Diplomito de la Esperanto-Asocio de Britio" (vom britischen Esperanto-Bund Diplomierte) nennen. Ich fand gut, dass ich die ganze Prüfung ausschließlich per Post und Telefon machen konnte. Hier die Adresse des britischen Esperanto-Bundes: Esperanto-Asocio de Britio, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE, Telefon: +44 (0)1782 372 141, Internet: <http://www.esperanto-gb.org>. Übrigens: Auf <http://www.esperantoeducation.com/exams.html> gibt es weitere Infos. Dort kann man auch einen Beispiel-Fragebogen herunterladen.

“Ni hao” signifas en Ĉinio “Saluton”

Mi partoprenis la 89-an Universalan Kongreson de Esperanto en Pekino. La kongresejo situas en la vilaĝo de Azia Sportkunveno en la norda parto de Pekino. Ĉi-foje, dum la unua kongrestago, ĉiuj partoprenantoj estis fotitaj por pribildita kongres-legitimilo. Partoprenis la kongreson 1976 personoj. El Ĉinio venis 1020 personoj kaj el Germanio alvojaĝis 76.

Mi ĉiutage partoprenis ekskursojn. Tiel mi vizitis jenajn vidindaĵojn:

1) *Tian'anmen-placo kaj la Imperiestra Palaco* (bedaŭrinde dum la pluvado): La Imperiestra Palaco estas nomata ankaŭ la Malpermesita Urbo. Ĝi estas la plej granda kaj plej bone konservata antikva konstruaĵaro de Ĉinio. La konstruaĵoj kaj la apartaj tegmentoj estas tre imponaj kaj belegaj.

2) *La Granda Muro*: Unue ni vizitis ŝtonfabrikon kun vendejo de diversaj jadŝton-artaĵoj, poste la Dingling-maŭzoleon. Ĝi estas la tombo de imperiestro Shenzong kaj liaj du edzinoj de la Ming-dinastio. La konstruaĵoj konsistas el maŭzolea pordego, haloj, turoj kaj subpalaco. En tiu estas la tombo kaj multaj trezoroj kun valoraĵoj. Poste ni vizitis la Grandan Muron ĉe Badaling, kiu estas 75 km for de la urbcentro de Pekino. La Granda Muro havas 6700 km da longo kaj ĉe Badaling 8 m da alto. Bedaŭrinde ni havis nur du horojn da restado.

3) *Tianjin*: Tiu estas granda urbo, kiu situas du horojn da aŭtoveturado de Pekino. Tianjin estas grava industria kaj komerca, granda kaj fama historia urbo en la nordo de Ĉinio. Tie ni vizitis historian kvartalon. Dum la tagmezo ni estis en la supertegmentita manĝostrato. Tie oni ricevas dolĉajn kaj varmajn manĝaĵojn kaj multe pli. Poste ni vizitis la budhisman monaĥejon Dabaj, la Dabajuan Templon.

4) *Ĉielo-altaro kaj Granda Pordego*: Ĝis la altaro estas longa koridoro kun belegaj montraĵoj. La altar-tegmento estas blua, ĉefe por simboligi la ĉielon. La ĉefaj konstruaĵoj estas la Preĝa Halo de Riĉa Rikolto, Huangqiongyu-halo, Fasta Palaco, Rondaltaro kaj Eĥa Muro.

Poste ni vizitis la Grandan Pordegon. Antaŭ tiu estas la Imperiestra Palaco. De supre oni havas bonan vidon al parto de Pekino, interalie al la Tian'anmen-placo.

5) *Zoo de Pekino kun pandoj kaj la Somera Palaco*: Unue ni vizitis la zoon. Bedaŭrinde ni havis nur 20 minutojn da tempo. Tie mi nur vidis tri pandojn. Poste ni vizitis la Someran Palacon. Ties ĝardeno estas la plej granda kaj plej bone konservata el la ĉinaj imperiestraj ĝardenoj. La parko havas 290 ha da areo, tri kvaronoj de ĝi estas akvo, nome la Kunming-lago ĉe la piedo de la Monteto Longviveco, kiu estas la fokuso de la ĝardeno. Unue ni migris trans la lago, tra la bela koridoro ĝis la Ŝtonŝipo. Poste ni reveturis per la Drakŝipo ĝis proksime al la enirejo. La pli ol 700 m longa koridoro interligas la grandnombrajn konstruaĵojn antaŭ la Monteto Longviveco kaj sin prezentas kiel la ĉefa vidindejo de la parko.

Tie la trafiko estas speciala: Estas permesite preterveturi dekstre kaj hupi. Dum la tuta mateno de la ekskurso-tago, policistoj reguligis la trafikon por ok ekskursbusoj kaj eskortis tri busojn ĝis la Granda Muro.

Dum la tuttagaj ekskursoj ni manĝis en ĉina restoracio. En la centro de rondtablo estis turnebla disko, sur kiu staris diversaj manĝaĵoj, el kiuj oni povis elekti. Ekzemple estis supo, legumoj, frititaĵo, brasikoj, tomatoj, kolbasoj, terpomoj, kokviandoj, salatoj, melonoj kaj “Goubuli-Baozi” (vaporumita farĉa kuketo; ĝia farĉo el muelita porkaĵo estas mola kaj sukplena, sed ne grasa, delikata kaj parfumita). Tie mi lernis manĝi per bastonetoj. La manĝaĵoj estas manĝeblaj. Estis rekomendite al mi manĝi ĉe McDonald's, sed mi ne faris tion. Al nordeŭropanoj, la matenmanĝaĵoj estis al kutimiĝendaj. Ili konsistis el molaj bulkoj, interne de kiuj estis ĉokolad-kaĉo aŭ marmelado, kaj krome el diversaj nekuiritaj aŭ krudaj manĝaĵoj: ruĝa brasiko, blanka brasiko, verda laktuko, kolbas-speco, ovoj (tre malhele kuiritaj aŭ rostitaj), tomatoj, kukumoj, rizkukoj, rizsupo, blankaj pastaĵoj, patkukoj kun ŝinko kaj legumo, diversaj frititaĵoj, legumoj, broko-kolbaso, vaporumitaj farĉaj kuketoj kaj ankaŭ ne-klarigeblaj manĝaĵoj, kukoj kaj melonoj. En la kongresejo estis ankaŭ malgranda manĝejo. Tie ĉiutage estis ofertataj nur aŭ “Hamburger”-oj aŭ sandviĉoj po kun kafo, suko aŭ jogurto; kosto: 20 juanoj (RMB). Nu, pri gustoj oni nepre disputu. La kafo estis bongusta.

Dum la semajno estis jenaj vesper-aranĝoj: nacia vespero, balo (en hotelo apud la kongresejo), moderna muziko kaj dancado en la kongresejo; teatraĵo “Judita” (monodramo de kroata dramverkisto), junulara vespero (“Espera Mondo”) kaj internacia vespero.

La merkredon estis nenia kongresprogramero. Okazis hazarda renkontiĝo kun kelkaj homoj el diversaj landoj en la hotelkoktelejo. Tio estis tre amuza kaj interesa.

El la kongresprogramaj prezentoj, mi vizitis la magian spektaklon de la magisto sinjoro Schönberner el Germanio. Mi aŭdis la prelegon pri reta mondo per Esperanto kaj vizitis la libroservon kaj la raportojn pri la venontaj kongresoj.

Mi loĝis en la hotelo Bejing Continental Grand Hotel (kvar steloj) apud la kongresejo. Mia ĉambro estis en la 13-a etaĝo. De supre mi havis belan vidon.

Mi havis belegajn imponajn flugojn je preskaŭ klara vetero. Mi ekflugis de Düsseldorf al Pekino inter-surteriĝe en Vieno. La flugo daŭris entute dek unu horojn. La tempo en Pekino estas ses horojn antaŭ la tempo en Germanio.

(Anne Höpken)